



## Lernojaro komenciĝis

Aŭtorino: Anna Rudawcowa

Esperantigis: Krystyna Grochocka

Ŝpruc'! plumingo elsaltis el la fingroj de dormema Zbiĉjo kaj komferte dismetiĝis sur puraj folioj.

- Ho, ho, ho! Mia vestaĵo – ĝemis tima kajero.

- Bonvolu atenti – aldonis libro, rapide forŝovante novajn kovrilojn – vi ŝprucigis min per inko, sinjorino.

- Mia vestaĵo! - Ploris kajero – kiel mi nun aspektas, tuta enmakulita! -

Pardonu, pardonu! Zbiĉjo ekdormis tiel subite, ke mi ne povis teni ekvilibron, - timeme klarigis kulpulino. – Mi bedaŭras, ke mi faris tiom da konfuzo.

Lernojaro komenciĝis - grumblis maljuna inkujo – atendu iomete miaj gesinjoroj, kaj baldaŭ ni ĉiuj troviĝos en pli malbona kriza situacio.

- Vi tro pesimisme rigardas la mondon, sinjoro – akordiĝeme aldonis sorbopapero. – Se oni plenigus min per ruĝa inko, eble mi rigardus pli roze, sed nun mi estas konvinkita, ke atendos nin multe da malagrablaj momentoj. Ĉu vi scias, kio estas lernojaro? Senĉesa laboro en servoj de infanoj, plurfoje sendankemaj, maldiligentaj kaj malordaj. Mi ne estas certa, ĉu ĝis la printempo ne restos de mi nur pecetoj!

-Se Zbiĉjo ne ekdormus nun dum lernado de siaj lecionoj, mi ne havus makulitajn foliojn – denove ĝemis kajero.

– Ĉi tio ankoraŭ estas nenio. Se iu havus rajton por plendi, tiu estus nur mi – ploreme ekparolis multobligita tabelo. – Mi ne scias kial infanoj ne ŝatas min. Ja mi penas instrui ilin gravan kaj utilan aferon. Sen mi ili ne trovus rimedon en la vivo. Kaj Zbiĉjo, la knabo tute nestulta, rigardas en mia flankon tre malamike. Foje eĉ li batis min per pugno kun tuta forto, ĉar li ne povis memori kiom da estas 8 oble 8.

- Ĉi tio estas indigna! – serioze koleriĝis inko. – Ni ne povas permesi tion. Mi opinias, ke ni farus plej bone, se ni ribeligus kaj rifuzus servon al Zbiĉjo kaj al ĉiuj malzorgemaj infanoj. Restu malkleruloj, se ili ne volus dece respekti nin. Ni iru en la mondon serĉi lernemajn kaj diligentajn infanojn, kiuj ne dormas dum lecionoj, kaj kiuj ne torturas bedaŭrindan multobligitan tabelon!

- Momenteto! – vokis libro. – Lernojaro ĝuste komenciĝis kaj mi forte kredas, ke Zbiĉjo kun tempopaso pliboniĝos. Cetere, vi mem konsentis, ke li ne estas la plej malbona infano. Mi konsilas atendi ankoraŭ, kaj intertempe mi provos lin malrapide ŝanĝi lin en modelan lernanton. Mi esperas, ke mi sukcesos .

– Jes, jes tio estas bona ideo! Provu! – kriis kajero - eble li komprenos, ke oni ne povas dormi dum lecionoj! – ke oni ne povas difekti ŝtalplumojn! - Rompi inkujojn! - Detruu librojn! – Damaĝi senbezzone multobligitan tabelon! Ke oni devas bone lerni kaj gardi ordon en nova lernojaro!

- Silento! Zbiĉjo vekigis! Sur la tablo ekregis kvieto. Li malfermis la okulojn kaj levis la kapon super makulitaj folioj.

- Mi aŭdis ĉion, - kaj mi promesas, ke de tiu tempo estos alie!